Dum tiu metodo certa mezur-palpilo aŭ kalibrocirkelo estas fiksita al folio, kies dikeco estas determinita je ekzakteco de milopa milimetro, ilustras la esploristoj *Yehoshua Sharon* kaj *Ben-ami Bravdo* de la Instituo por Agrokulturo de la Hebrea Universitato Jerusalemo en Rehovoto: "La dikeco de folio dependas de la ententata akvokvanto". Sana folio konsistas el ĉirkaŭ 60% da akvo. Maldika folio do estas signo, ke la planto "soifas". Tio signifas streson kaj estas malavantaĝa por la rikolto. La mezurilo konsistas el du platoj, el kiuj unu estas movebla pro risorto. Ĝi samtempe registras la tension. La signaloj estas direktataj al komputilo, kiu alĝustigas la akvumadon de la plantoj al ties bezono.

Kontraŭe al instalaĵoj kiuj irigacias la plantojn en regulaj interspacoj, oni nun povas daŭre irigaciadi "sed la plantoj ricevas la ekzakte ĝustan kvanton da akvo je la ekzakte ĝusta tempo", klarigas s-ro *Sharon*. Laŭ studoj de la esploristoj plialtiĝas la grapfruktorikolton je 15% ĉe 40% malpli da akvokonsumado. Ĉe kapsikaj plantoj la rikolto estis 5% pli alta ĉe 60% ŝparo de akvo. "Ĝis nun esploristoj determinis la streson de plantoj nur per temperaturŝanĝoj kaj pedunkla dikeco", komentas *John Sadler*, sciencisto de Ŝtata Agrikultura Esploroficejo en Sudkarolino, Usono. Li konsideras la novan metodon treege interesa. La esploristoj intertempe kreis entreprenon por merkatado de la eltrovaĵo. (Fonto: *dpa* en *SonntagsZeit*, 2001-05-20, p.12)

Sunradia kurento per ŝtofo, kiun lumas la suno

Fizikistoj prilaboras vestaĵojn, kies fibroj estas surtavoligitaj per treege delikataj sunbateriaj piloj. Tiuj povus, kiam la suno prilumas tiajn pulovrojn aŭ pantalonojn, produkti kurenton por malgrandaj elektraj aparatoj. "La baza funkcikonfirmo jam ekzistas", diras fizikisto *Martin Rojahn* de la Instituto pri Fizika Elektroniko de la Universitato en Stutgarto, Germanio. El tio tamen neniu tiru tro fruajn konkludojn kaj atendu, ke jam baldaŭ pulovroj el tia materialo povus anstataŭi bateriojn por MP3-muzikiloj aŭ mobilaj telefonoj. "La esploroj tute ne estas jam tiom profundaj", diras la doktoriĝkandidato. Same kun siaj kolegoj s-ro *Rojahn* unue sedimentigis sur dratojn plej fajnajn tavolojn de silicio. La nur kelkaj nanometroj (1 nm = 10^{-9} m) dikaj tavoloj ne fordispecitiĝas de la plastofibroj, kiam oni permane ĉifas la materialon. Oni povas ĝin faldi kaj reen malfaldi, raportas *Rojahn*. La esploristoj fakte havas la ideon pri lavebla vestaĵo kun integrita sunenergia pilo. "Jam ekzistas diskutoj kun tekstilindustriaj firmaoj por tion elprovi". (Fonto: *dpa* en sama gazeto)

Terminologia angulo

Pri grafo, jungo, konstrukto kaj puco

La aŭtoro estas profunde konvinkita pri la neceso, konservi la originan lingvon de *L.L. Zamenhof*, tamen li klopodas la lingvon levi al nivelo taŭga por senproblema aplikado en kiu ajn medio, do ankaŭ en la fakaj komunikado kaj informado. Li trovas en Esperanto nociajn "vakancojn", kiujn li ne toleras, sed serĉas solvojn.

Kelkajn novismojn en la teksto de lia kontribuo "**Loĝi energiŝpare**" en tiu ĉi kajero de Scienca Revuo (*Scienca Revuo 3/2001*, p. 25-36) li jam sufiĉe glosis, ekz. "emisio" kaj "rekuperi varmon". Aliaj en la artikolo menciitaj nocioj tamen bezonas pli detalan pripensadon.

1.) grafo (en matematiko) - strukturo donita per aro de nodoj kaj per aro de strekoj kaj per certaj rilatoj inter la elementoj de ĉi tiuj aroj; (ĝenerale en fakoj) - ebena aŭ spaca rezulto de bildigo de rilatoj, procesoj, procedoj, statistikaj indikoj, funkciaj dependecoj.

Por la matematika nocio *C.O. Kiselman* proponas **grafio,** *R. Hilgers-Yashovardhan* en la EK-vortaro proponis **grafikaĵo** laŭ PIV. Estas vero, ke **grafo** estas fundamenta vorto, kiu esprimas certan nobelon. Sed indas aldoni, ke fundamenta estas ankaŭ la morfemo **graf** signifanta "priskribon" kaj devenanta el la greka "grafein" (gravuri, skribi). En la Fundamento ĝi troviĝas en la Ekzercaro, §3, en la vorto **geografio**. Plue estas la morfemo en la Fundamenta Krestomatio, vd. **grafologio**, p.194, linio 6.

Faka lingvostilo, precipe ĝia leksiko, estas en la lingvoj de evoluintaj nacioj planata. Estas utile kaj finfine ankaŭ relative facile atingi konvencion, ke la grek- kaj latindevenaj kunmetitaj vortoj ne estu arbitre malkomponataj, ekz. geografio al geo kaj grafio, ĉar tia amase aplikata procedo estus malutila pro kresko de nedezirata sinonimio. Sed en iuj kazoj la vortoj jam ekzistas aparte, ĉu en radika formo, kiel ekz. spektro el spektrografo, spektrometro, ĉu en stama formo, kiel ekz. grafemo, grafiko, grafito. En tiuj kazoj la vortoj konsistas el la radiko **graf**, la sufikso (-em, -ik, -it) kaj finaĵo.

Prof. *Kiselman* al la radiko **graf** aldonas la sufikson "i", nekonsiderante ĝin sufikso. El terminologia vidpunkto tio estas netolerebla. Ni konsciu, ke la sufikso "i" estas grek- kaj latindevena kaj signifas plej ofte fakon, sciencon. **Grafio** estus fako pri bildigado. Sed lia celo estis nomi, nomumi "rezulton de bildigo", respektive en matematiko certan "strukturon". Se estos interkonsentite uzi la morfemon **graf**, estos plej oportune kaj racie preni la morfemon sen plia afikso, ĉar